

Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2019

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2019 okazis entute 12 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa), 1 ĝemelurba renkontiĝo kaj neniu estrara kunveno, kvankam la estraro tamen komunikis.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 3 kaj 7 membroj, meznombro 4,7 (la mezaj nombroj por la jaroj 2006–2018 estis respektive: iom malpli ol 7; inter 6 kaj 7; 6,6; 6,5; 7,1; 6,9; 6,9; 7,4; 6,8; 6,6; 6,4; 5,1; kaj 5,2 en 2018). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklačo post (parte eĉ dum) la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al la membroj praktiki la lingvon. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo *Næring og samfunn*, tamen dum la aŭtuno partoprenis maltrio da membroj por tia subvencio. La kunvenoj, temoj kaj festoj en 2019 estis:

- 11.2.: *Klubkunveno*. Ni kafklačis kaj planis la printempan programon.
- 25.2.: *Tradukado de Pondus*. Judith Parelle Abrahamsen preparis bildstriojn.
- 18.3.: *Restado en Berlino*. Torstein Kvakland rakontis.
- 25.3.: *Ni aŭskultas la sonojn de la 50-jara GET-jubileo en 1957*. Herman Ranes bitigis sonbendojn en nia kluba biblioteko.
- 8.4.: Jarkunveno.
- 29.4.: *Ĉiuj rakontas pri io*.
- 27.5.: *Vojaĝo al Brazilo*. Ulf Stenhaug rakontis kaj montris bildojn.
- 14.6.: Ĝardena festo.
- 16.9.: *Spertoj kaj impresoj dum la Universala Kongreso en Lahti*. Herman Ranes rakontis kaj montris bildojn.
- 19.9.: Ĝemelurba renkontiĝo (vd. sube).
- 30.9.: *Feroaj insuloj*. Ulf Stenhaug rankontis pri vojaĝo kaj montris bildojn.
- 14.10.: *Tradukado de Pondus*. Judith Parelle Abrahamsen preparis bildstriojn.
- 28.10.: *Ĉiu parolu pri io dum kvin minutoj*.
- 11.11.: *Bonaj/malbonaj/interesaj spertoj pri aĉetado de domo*. Herman Ranes rakontis kaj ĉiĉeronis.
- 2.12.: *Ni ekzercu malnovajn esperantajjn kantojn*. Aldone Ulf Stenhaug rakontis pri vojaĝo al Kipro.
- 14.12.: Zamenhofa festo.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2019, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj pri GET en la gazetaro.

Membrostatistiko

En 2019 GET havis 12 membrojn. (Por la jaroj 2006–2018 la nombroj estis respektive: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, 15, 16, 16, 14, kaj 13 en 2018). Ekde 2019 NEL kalkulas la klubsubtenon laŭ la membronombro la 31an de oktobro, antaŭe la 31an de decembro.

Partopreno en naciaj aranĝoj

En 2019 okazis Landa Kongreso en Tromsø. Partoprenis unu GET-ano: Herman Ranes.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Unu GET-ano partoprenis la Universalan Kongreson en Lahtio: Herman Ranes.

Aliaj aranĝoj

Anne Karin Bondhus en Bryne, kasisto de NEL, forpasis en majo, nur 51 jarojn aĝa. Dum pluraj jaroj ŝi estis aktiva membro de GET. La funebra ceremonio okazis en Time kyrkje la 11an de junio. GET kontribuis per florbukedo, kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen ĉeestis kaj donis paroladon nome de NEL.

Aktivuloj en Esperantogrupo de Darmstadt, Detlef Haußner kaj Susanne Warmuth, vizitis Trondheim en septembro. Darmstadt estas ĝemela urbo de Trondheim, kaj ni konas la grupon de de jaroj. Ni ariĝis por renkonti ilin por babili kaj manĝi hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen, kaj pluraj membroj akompanis ilin en la urbo.

Vortara laboro

Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Ne estis aktiveco dum 2019.

Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 16 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2018 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, 22, 20, 19, 19, 19). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2019 sendiĝis 95 mesaĝoj per la listo (por la jaroj 2012–2018 respektive: 68, 96, 45, 56, 38, 66, 51).

Biblioteko kaj aliaj libroj

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007. Dum la jaroj, libroj el tiu valizo disdonaciĝis kiel premioj dum la Zamenhofaj festoj, kie kutime okazas lotumado. En 2016 Arne Olav Mjøen transdonis eĉ plian skatolon da libroj origine de la eldonejo. Ankaŭ tiuj estas vendeblaj kaj ne bibliotekaj.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj

Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2019.

Ekstera mono

Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2019 Norsk Tipping pagis al la klubo 2480,07 kronojn (3795,40 en 2018). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet næring og samfunn*, kiu dum 2019 pagis al la klubo 500 kronojn (500 en 2018).

Postenoj

Estrarar dum 2019, elektita de la Jarkunveno la 8a de aprilo 2019

Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaus (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 8an de aprilo 2019

Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2019

Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

Estraraj postenoj de klubanoj en NEL kaj Legaco Uhlen en 2019

Vicprezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Sekretario de NEL: Ulf Chr. Lunde en Os (ĝis la Landa Kunveno)
Anstataŭanto 2 de NEL: Herman Ranes (post la Landa Kunveno)
Revizoro de NEL: Ulf Stenhaus
Vicrevizoro de NEL: Jørgen Åldstedt (ĝis la Landa Kunveno; la protokolo de mencias elekton de nova vicrevizoro)
Estrarano kaj prezidanto de Legaco Uhlen: Herman Ranes
Estrarano de Legaco Uhlen: Judith Parelie Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2019

Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2019

Membro de la elekta komisiono de NEL ĝis la Landa Kunveno: Herman Ranes
Anstataŭanto por NEL en la Domkomisiono: Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaus
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegito de UEA: Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobata de la Jarkunveno de GET la 30an de marto 2020.